

Sennacieca Revuo

n-ro 143

2015



Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)

Sennacieca Revuo estas eldono de SAT

Asocia sidejo de SAT

67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio
Telefono: +33 1 47 97 71 90 — +33 9 50 71 01 97
satesperanto@free.fr
www.satesperanto.org
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064 BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s

Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markovo
Vic-prezidanto kaj eldonestro: Guy Cavalier
Sekretario: Diana Riŝar
Kasisto: Bruno Henry
Vic-kasistino: Franjo Lévêque
Ceteraj membroj: Pedro Sanz, Dominiko Simeone, Pierre Soubourou (Ŝtonĉjo)

Sennacieca Revuo

Redaktoskipaj kunordigantoj: Vinko Markovo, Pedro Sanz
Enpaĝiganto: Ĝilo Pérez
Ceteraj redaktantoj: Robin' Beto, Djémil Kessous, Gary Mickle, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Rikardo Schneller, Serĝo Sir', Franciska Toubale

Kontribuojn por ambaŭ gazetoj sendu elektronike al

sennaciulo.redaktejo@gmail.com aŭ paperpoŝte al
SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent-Auriol, FR-75013 Paris, Francio

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par : TROIS A, 4 rue Théodule-Ribot, FR-75017 Paris.

Aperas ĉiujare. Parution annuelle.

Le directeur de la publication : Guy Cavalier

Abonnement annuel — *Jara abono*: Francio 39 eŭroj

Autres pays — *Aliaj landoj*: vidu la detalojn en la kotiztabelo presita en *Sennaciulo*.

Dépôt légal à la date de parution : n° CPPAP 0520 G 86567

Suppl. au n° 9-10 (1323-1324) de *Sennaciulo*

Enhavo

1	Prezento	5
2	Ja, vole nevole Esperanto estas revolucia lingvo (Ĵak Le Puil)	7
3	Enkonduko en la poezian universon de Federico García Lorca (Miguel Fernández)	13
4	La signifo de Avempace en filozofio (Antonio Marco Botella)	23
5	La unua amo (Roger Condon)	29
6	Klaus (Cezar)	39
7	Resuma historio de la indonezia lingvo (Heidi Goes)	47
8	Poezio: armilo ŝargita per futuro (Miguel Fernández)	57
9	Komunumo Whiteway kaj Gassy Marin (Arturo Prent)	63
	Per alud' (Georges Moustaki)	Dorsa kovrilo

Prezento

JEN antaŭ vi, kara leganto, nova numero de *Sennacieca Revuo*, via revuo. El-laborata per viaj kontribuaĵoj kaj danke al sinofera volontula laboro de membroj de nia asocio aparte konsciaj pri ĝia graveco, ĉi-foje ĝi malfermiĝas per eseoj de *Jak le Puil* argumentanta la revolucion karakteron de la lingvo Esperanto. Revolucion ankaŭ prikantis *Moustaki*, pens-instiga muzikisto antaŭ nelonge forpasinta, kiun ni modeste omaĝas per aperigo de la teksto de unu el liaj kanzonoj. Per milda voĉo kaj profunda enhavo, kontraste al hodiaŭaj kriemaj neniodirantoj, *Moustaki* sukcesas tuŝi nian animon. Ankaŭ profunda la enhavo de la poezio de *García Lorca*, kiun *Miguel Fernández* prilumas per elstara informriĉa studo klariganta gravajn detalojn por ĝia korekta kompreno. Tuj poste ni restos space proksime de *Lorca*, universala andaluzo, sed estos tempe foren transportataj al ankoraŭ malbone konata mezepoka *Al-Andalus* pere de eseoj de *Antonio Marco* pri plej elstara, kaj preskaŭ plene forgesita, tiutempa filozofo *Avempace*. Revenante al pli freŝaj tempoj, ni ĝuos teneran rakonton priskribantan junaĝajn memoraĵojn de *Roger Condon*. Kaj tion sekvas alia rakonto, ĉi-foje elplumaĵo de *Cezar*, tra kiu, kvazaŭ tute nature, likiĝas radikala soci-politika kritiko. Informriĉan eseon pri temo aparte ŝatata de esperantistoj, la historio de la indonezia lingvo, majstre disvolvas *Heidi Goes*, kiu malkovros al ni gravajn detalojn de la reala, komplika, evoluo de tiu lingvo. Kaj nun la vico alvenas al plej altkvalita literatura verko, kiu vidis la lumon kadre de nia neforgesebla madrida kongreso: la grandioza antologio de poezio kontestema, engaĝiĝinta, socia kaj revolucia *Poezio: armilo ŝargita per futuro*. Kaj el kongreso al kongreso pere de prelego de *Arturo Prent* realigita en Dinano pri la komunumo *Whiteway*, inspirita de la ideoj de *Tolstoj* pri simpla kaj justa vivo, kaj pri *Gassy Marin*, fervora esperantisto kaj anarkiisto, kiu partoprenis tiun komunumon.

Kaj nun, ek al la legado! Ni esperas ke ĉi legado estos inspir-dona kaj renovigos en vi la deziron plu perfektigi kaj kunkreski, esencaj celoj de SAT.

Ja, vole nevole Esperanto estas revolucia lingvo

Ĵak Le Puil

LA vorto mem „revolucio“ timigas multajn homojn, ankaŭ min kompreneble. Ĉu oni povas ĝoji pri sangaj revolucioj? Ŝajnas ke jes por kelkaj, sed por mi certe ne, kaj ne pri tiaj revolucioj mi pensis, kiam mi proponis mian hodiaŭan temon!

Kompreneble mi pensis pri la dua difino de „revolucio“ en PIV: „Subita profunda ŝanĝiĝo en la irado de afero.“ Cetere, kaj bonŝance por mi, PIV donas tute taŭgan ekzemplon, kiu estas frazo de Zamenhof mem:

Plej grandaj elpensoj ne faros en la vivo de la homaro tian bonfaran revolucion, kian faros la enkonduko de lingvo internacia.

Ja Zamenhof sciis pri kio li parolis. Jam en Ĝenevo en 1906 li deklaris:

El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas ĉiuj elŝiri el nia koro tiun parton de la esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto! Ho, ne, ne, neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: „Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!“

Se tiu diro ne estas revolucia, kio do ĝi estas?!!!

Kaj en parolado de E. Lanti en Svedio, en 1933, okaze de la 13-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, ni trovas tiun diron:

Ni havas la firman konvinkon, ke la artefarita lingvo portas ion en si revoluciecan. Tiun „ion“ Zamenhof malprecize nomis „interna ideo de esperanto“, kaj estas fakto, ke tiu pli-malpli nebula koncepto pri la signifo de



tutmonda lingvo forte ligis kaj subtenis la unuajn pionirojn de la esperanta movado; tiu idea ligilo estas eĉ unu el la kaŭzoj de la sukceso de esperanto super konkurencaj projektoj.

[...]

Ĉio, kio helpas faligi la murojn inter la popoloj, estas ja en si mem revolucia.

[...]

mi opinias, ke ne necesas klarigoj por kompreni, kian grandan rolon povas ludi esperanto en la necesa tasko ĝisradike detruigi la naciismon, kiu infektas diversgrade la tutan mondon kaj malhelpas ĝian unuiĝon...



Ĉu la deziro detruigi naciismon ne estas revolucia ideo? Cetere, antaŭ ol Lanti, Zamenhof deklaris:

Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron, kiu dividus sin nur laŭ teritorioj, sed ne laŭ gentoj kaj religioj. Estas vero ke la nacionalismo de gentoj premataj — kiel natura sindefenda reago — estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de

gentoj premantaj; sed se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian kaj prezentas eraran rondon da malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute neŭtrala.

Ankaŭ artikolo de Eugène de Zilah el *La Gazeto*, 89 (junio 2000), alportas akvon al mia muelejo (kiel diris Zaza!):

Ekzistas do supernacia esperanta komunaĵo, sed kiucele? Ĉu franco aŭ ruso elmetadas al si la demandon: kiucele mi apartenas al la komunaĵo de la francoj, de la rusoj? Analogie: ĉu nepras ke esperanto sciu „kiucele“ li apartenas al la komunaĵo de esperantoj? La nura fakto de la ekzisto de la esperanto sufiĉas por ke kreiĝu etikaj kaj kulturaj valoroj. Esti esperanto, paroladi, vivi kaj pekadi en la esperanta lingvo, jam estas agado kontraŭ certaj negativaj premoj de la mondo, agado simila al la nuda defilado de duĥoborinoj¹. Mi ne diras ke ni kontentiĝu per tio, aŭ ke ĉiuj devas kontentiĝi per tio. Mi nur konstatas, ke esperantoj esperis eskapi la spiritajn premojn de siaj naskiĝlingvaj komunikaĵoj kaj per sia lingvo ili iel sukcesas.

Do, nedubeble ke por Zamenhof, Lanti kaj de Zilah, Esperanto estas per si mem Revolucia afero. Ankaŭ por mi kompreneble, kaj mi plezure legas en raporto

1. *Duĥoboroj*: sekto kies membrinoj kutimas publike senvestiĝi por protesti.

pri „Esperanto-vivo en Svislando“ (Esperanto aktuell 2010/2) la konkludon de la aŭtoro Bruno Graf:

La fakto, ke Esperanto superis la aliajn projektojn, estas planlingva sukceso. La konstato, ke Esperanto ne vere penetris la socion kaj ne konvinkis la politikon, naskas dubojn pri la iamajna venko.

En tiu diro Bruno Graf tuŝas la du punktojn, kiujn mi intencis trakti: kial Esperanto superis la aliajn projektojn kaj kial ĝi ne konvinkis la politik(ist)ojn.

Unue pri la socio. Bone!, ĝi havas ja kion ĝi meritas... Ĉiu el ni konas homojn, ĉu rilatojn, ĉu amikojn, ĉu familianojn, al kiuj ni tute klare montris, foje de jaroj, kio estas Esperanto kaj kion ĝi alportas al ni, kaj konsekvence povus alporti al ili, sed tamen tiuj homoj, eĉ se ili ne restas indiferentaj, tamen ne penas lerni la lingvon. Ilin mi ne kompatas. Mi male kompatas tiujn, kiuj neniam aŭdis pri Esperanto kaj kiuj tuj aliĝus al la afero se ili sciis, ke ĝi ekzistas kaj sciis kion ĝi povos alporti al ili! Por tiuj, aŭ pro tiuj, cetere, ni estas kondamnitaj — ĉar ja dum tiu tempo ni povus prizorgi niajn proprajn aferojn, ekzemple skribi prelegon pri iu ajn stulta temo... — do, mi diris, ni estas kondamnitaj starigi budojn, verki artikolojn kaj gvidi kursojn! (ni ne forgesu, ke nur dank' al sindonemaj homoj ni iam eksciis pri Esperanto!).



Bruno Graf

Nun pri „politiko“ aŭ pli ĝuste politikistoj. Krom kelkaj „utilaj idiotoj“, kiel diris mia forpasinta amiko el Brazilo Gilbert Ledon, politikistoj ne estas fidindaj homoj, do mi povas nur ĝoji se ni ne sukcesis konvinki ilin! La malplej hipokritaj, t.e. diktatoroj, kiel Hitlero, Stalino aŭ Salazaro, tute logike malpermesis Esperanton. Kaj tio laŭ mi sufiĉus por montri la revolucionan karakteron de internacia lingvo kreita, ĝenerale, kaj de Esperanto, pli precize. La aliaj „demokrataj“ politikistoj plej ofte tute ignoras la problemon. Foje ili tamen konsentas diri ke la ideo en si mem estas nobla, sed ĉiam regardas la samajn argumentojn por malhelpi instruadon de Esperanto en lernejoj: lingvo sen kulturo, sen popolo kaj aliaj stultajtoj. La plej aĉaj el tiuj politikistoj estas sendube la socialistoj, almenaŭ en Francio, kiuj preparis leĝ-projekton favore al Esperanto antaŭ la baloto por la prezidanteco en 1981, kiu vidis la venkon de François Mitterrand. Post tiu venko, kompreneble, revenis la samaj gurmaĵoj pri Esperanto.

Ŝajnas ke la politikistoj plej bone konsciis pri la danĝero de artefarita internacia lingvo. Ili ja scias, ke la plej potencaj landoj ĉiam altrudis sian propran lingvon por pli facile submeti aliajn popolojn. Hieraŭ la franca lingvo ĉefrolis tutmonde, hodiaŭ la angla/usona/dolara, morgaŭ iu alia. Same okazis kun la rusa en la tempo de Sovetunio. Ĉiuj koloniistoj altrudis sian lingvon al la indiĝenoj: la francan, la anglan, la portugalan, la nederlandan, la germanan, k. t. p. Sen forgesi

la perfortan malaperigon de la laŭdire „regionaj“ lingvoj, ekzemple en Francio la bretona, la okcitana, la kataluna, la eŭska, la flandra, la alzaca, la gaskona, k. t. p.

Mi havis la ŝancon lerni Esperanton, kiam mi estis 18-jara, ĉe anarkiistoj.

Kaj mi, kiu tiuepoke preskaŭ ĉion kritikis, neniam havis eĉ la plej etan rimarkon kontraŭ la lingvon. Mi tuj sentis ĝin vivanta lingvo, multe pli facila ol tiuj kiujn mi eklernis, kaj tutcerte dank' al ĝia revolucia strukturo!

Nedubeble la anarkiistoj pli ol aliaj konscias ke artefarita lingvo helpas al la emancipiĝo de la homaro. Cetere, en Parizo ekzistas de baldaŭ 30 jaroj Liberecana Radio Esperanto kaj ni ne forgesu ke la kreinto de la revuo Esperanto estis la franca anarkiisto Paul Berthelot. Kaj en artikolo de Michel Duc Goninaz en *Sennacieca Revuo* de 1993, pri „La lecionoj de la *Danĝera lingvo* de Ulrich Lins“, oni ĝoje legas:

... en la Esperanto-movado, la plej neŭtrala organizaĵo estas SAT, sed interne de SAT la plej neŭtralaj homoj estas la anarkiistoj, ĉar nur ili neniam subtenis (nek -as, nek -os) iun registaron, reĝimon, nacion, ŝtaton aŭ partion (ĉu ne ĝuste tio estas la plej alta grado de neŭtraleco?).

Sed tamen, mi ve iom seniluziĝe rapide konstatis, ke ankaŭ ĉe anarkiistoj multaj tute ignoras la lingvan problemon.

Nun, kial Esperanto superis la aliajn projektojn? Fakte mi devus diri „la alian projekton“, t. e. Volapukon. Ĉar nur Volapuko unue relative kontentige disvolviĝis. Sed kiam oni iom studas Volapukon, ĉefe ĝian vortrezoron, oni facile rimarkas, ke Esperanto estas multe pli facile lernebla, memorigebla, kaj ĉefe parolebla.

En la fundamenta krestomatiaĵo, oni legas la jenon en raporto verkita de S-ro Unuel (t. e. Zamenhof mem) en la jaro 1900, „Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia“:

... arta lingvo distingiĝas per la sekvantaj ecoj:

Ĝi estas mireginde kaj nekredeble facila por ellernado; sen trograndigo oni povas diri, ke ĝi estas almenaŭ kvindek fojojn (kvindekoble) pli facila, ol ĉia lingvo natura. Kiu ne konatiĝis kun lingvo arta, ne povas eĉ kredi, ĝis kia grado estas atingita ĝia facileco. La granda verkisto kaj filozofo Leono Tolstoj, kiun certe neniu en la tuta mondo kuraĝis suspekti en tio, ke li volas fari reklamon al la lingvo internacia, diris pri la lingvo Esperanto jenon:

„La facileco de ĝia ellernado estas tia, ke, ricevinte Esperantan gramatikon, vortaron kaj artikolojn skribitajn en tiu ĉi lingvo, mi post ne pli ol du horoj da sinokupado havis la eblon se ne skribi, tamen libere legi en tiu ĉi lingvo...“

Komprenu, sinjoroj, kion tio ĉi signifas: „post ne pli ol du horoj da sinokupado“! Kaj en tiu ĉi sama maniero espri-



Ĵak Le Puil



Ludoviko Zamenhof